BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974
CGC Nº
00406 504/0001-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

JAN/FEV/1984 BOLETIM INFORMATIVO Nº 81

## XX BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La 20-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos de la 12-a ĝis la 15-a de julio 1984, en Campinas, urbo de l' ŝtato São Paulo.


La Organiza Komitato de la Kongreso havas kiel prezidanton D-ro Osvaldo Sangiorgi, profesoro en la Universitato de São Paulo kaj membro de la Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, kaj kiel vicprezidanton D-ro Walter Francini, advokato, verkisto kaj estrarano pri kulturaj aferoj de BKE.

Kiel konate,tiu kongreson patronas NEK–Nacia Esperanto-Komisiono,en la nomo de BEL, KKE kaj BKE, sed pri la planado kaj organizado respondecas la Esperanto-Asocio de San Paŭlo.

La konstanta adreso de la Komitato estas: Rua Faustolo 124, CEP 05041, telefonnumero 62-1183, São Paulo-SP.

## PREMIITAJ SIMBOLO KAJ AFIŜO

En sia decembra kunsido la Estrato de UEA decidis,fermi la konkurson pri la jubileaj simbolo kaj afiŝo kaj premii la verkojn de **Hilmar Ilton S. Ferreira** el Itabuna en Brazilo (por la simbolo) kaj la duopon **Gyurkovics/Sekelj** el Subotica en Julgoslavio (por la afiŝo). La estraro konstatis, ke la reago al la konkurso estis multnombra kaj tre internacia, ĉar partoprenis multaj dekoj da kandidatoj el ĉiuj partoj de la mondo. Restas tamen por substreki, ke granda plimulto de la konkursaĵoj – en ambaŭ kategorioj – montriĝis esti nataŭga, ĉu pro idea banaleco, ĉu pro teknika primitiveco. La konkurso bele ilus-




tras la malbelan fakton, ke la informado pri Esperanto restas malmoderna kaj tial neefika. Ĉu necesas diri, ke amaso da konkursaĵoj volis plekti en sian projekton ĉion de Zamenhoj kaj la verda stelo ĝis mondmapo, Babelturo kaj barokaj pontoj? Pluraj el la konkursintoj ne komprenis, ke la simpleco estas grava konsista parto de la belo, ke tradiciaj movadaj simboloj portas nenian mesaĝon al la nemovada publiko, kiun la konkurso celis, kaj kiun unuavice devas celi nia tuta agado okaze de la Centjara Jubileo.

Elektante la du menciitajn verkojn la Estraro konstatis, ke ili ambaŭ bezonas finpoluron kaj kompletigon kaj tial ne meritas la plenan sumon (po mil guldenoj) de la anoncitaj premioj. La Estraro ne volas "ŝpari" parton de la premia mono, sed ĝi intencas uzi ĝin por subvencii plibonigon de kelkaj aliaj projektoj, tiel ke ni havu ja unu simbolon sed, se eble, plurajn afiŝojn por la Jubileo.

La Estraro decidis, ke la premiitaj verkoj kiel eble plej baldaŭ kaj plej vaste diskoniĝu, tiel ke oni ekuzu ilin tra la Movado. Tre Baldaŭ UEA mem presos la premiitajn verkojn en plej diversaj formatoj, por kiel eble plej multflanka utiligo.

**(Revuo Esperanto, januaro 84)**




## KRUCVORTENIGMO

GOVaske - RS

**HORIZONTALE:**

1) - Ĉeforganizaĵo; 2) - Publikaj aŭ privataj ceremonioj k plezuro por soleni okazaĵon; 3) - Solene enoficigi; 4) - Membro de estraro; 5) - Apartenanta al la regiono trans la morto (apostrof.); 6) - Troviĝanta el la favora sezono (pluralo); 7) - Atentiga interjekcio; 8) - Konjunkcio, uzata post supereca aŭ malsupereca komparativo; 9) - Alpliki forton por eligi likvaĵon; 10) - Aro de ŝeloj ŝpinitaj aŭ sekreciitaj de diversaj animaloj por ŝirmi en eli la ovojn dum ilia evoluo (apostrofite).

**VERTIKALE:**

1) - Aro da verdaj idealistoj; 2) - Senkaraktera individuo; 3) - Poŝtkarto; 4) - Prepozicio montranta lokon, interne de kiu estas io aŭ iu. 7) - Konjunkcio, uzata post alia nea vorto kaj signifkanta "ankaŭ ne"; 8) - Korinklino al iu. kies feliĉon oni deziras (inverse); 9) - Norda Konstelacio (Apostrofite).

**Solvo de la enigmo sur la paĝo 7-a**

---

**Galerio de Brazilaj Poetoj**

## GERALDO MATTOS

Geraldo Mattos Gomes dos Santos, 52-jaraĝa, membro de la Akademio de Esperanto, doktoro pri Portugala Lingvo, profesoro en la Katolika Fakultato de Filozofio de Curitiba-PR, kaj libera docento en la samurba Federacia Fakultato de Filozofio, estas aŭtoro, inter diversaj literaturaj verkoj, de La Tento de Junulo(1953) Ivan la VI (1953), La Nigra Spartako (1955), Miniaturoj (1959), Arĉoj (1967) kaj Ritmoj de Vivo (1968).

El la antaŭlaste menciita verko, Arĉoj, poemaro ampleksanta cent naŭ sonetojn prezentitajn sub tradicia formo kaj laŭ la klasika parnasa stilo, ni prenis la suban admirindan juvelon, por la ĝuo de la poeziamantoj.

**Akvoj Voluptaj**

*Mi vidis: kun la korpo kaprice etendita*
*sur la leĝera sablo de pledmurmura bordo,*
*ŝi kuŝis en la molo de pozo aminvita,*
*montrante la spektaklon de rava trajtagordo.*
*La ondajn movojn sekvis la sangekscita*
*de ŝiaj mamoj indaj je kiso kaj je mordo;*
*atingis tuŝebrie jam maro infinita*
*ĝis ŝiaj logaj kruroj, en sugestia tordo.*
*Ŝi levis sin, depuŝis la sablon de la flankoj*
*kaj plonĝis en la sinon de dolĉaj ŝaŭmoblankoj;*
*la maro ŝin akceptis per amdeklara zumo!*
*La ondoj (mi ĝin vidis!)ŝin stringostreĉe ĝuis*
*kaj kiam ŝi emerĝis,seksincititaj fluis*
*el ŝia mam' kaj ventro,sub ŝia bankostumo...*

Ni nur bedaŭras, ke Geraldo Mattos antaŭlonge ne plu plezurigas la esperantistan mondon per novaj kreitaĵoj de sia naturdevena inspiro. Sed ni esperas, ke tiu ĉi senpretenda kroniketo efiku kiel pikilo stimulanta la poetikan kreopovon de nia senkompara poeto kaj verkisto.

**Berenice K. Eliot**


## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

**HONORA PREZIDANTO**

Francisco de Souza Almada - Av. Bernardino de Campos, 624 ap. 72, BR 11100 - Santos - SP.

**Estraro**

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás, 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

**Vic-prezidanto:** Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15, BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

**Informa Bulteno**

Dumonata Oficiala Organo de la Asocio
Jarabono Cr$ 2.000,00
Por aliaj landoj, US$ 5.00
Asociaj membroj ricevas ĝin senpage

**RESPONDECAJ DIREKTOROJ**

Carlos A. S. Cunha (ĉefredaktoro), Nelson P. Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.



# BRAZILAJ NOVAĴOJ

## FEDERACIA DISTRIKTO

★ Tuj post la karnavalo, s-ano Carlos Cunha,kiel kasisto de la Loka Organiza Komitato de la 66a UK, faris la lastan paŝon por fini sian plurjaran financan laboron je servo de tiu kongreso. Temas pri transpago al Associação Brasiliense de Esperanto, en Brazilja, de Cr$..... 5.006.536,75, saldo de la kongresa profito sub administrado de sr-o Cunha en nia lando. Krome, EAB ankaŭ ricevos la sumon de 9.252,07 guldenoj (Cr$3.882.446,00),kiu estas deponita je sia dispono, en Roterdamo. Per la tutaj monrimedoj, laŭ informo de D-ro Enivaldo Alves Silva, vicprezidanto de LKK, la Asocio intencas aĉeti sian propan sidejon kaj dividi la saldon de la bonhavo kun aliaj lokaj organizaĵoj, en harmonio kun la artikolo 31-a, de la Regularo pri Universalaj Kongresoj. Oni atendu!

★ La Brazila Biblia Societo (C.Postal 10-2371, BR 70000-Brasília) anoncas, ke jam estas aĉeteblaj "La Sankta Biblio" kaj "La Nova Testamento".

★ Laborgrupo Antaŭen (C.Postal 07-1055, BR 70000-Brasília) partoprenis en la Foiro de Spiritismaj Libroj okazinta ĉe "Plataforma Rodoviária" kaj organizita de Soc. Divulgadora do Espírito Cristão kai Sanatório Espírita de Brasília. Oni vendis 102 esperantajn librojn por ĉirkaŭ Cr$ 80.000,00.

## AMAZONAS

★ Jus aperis la unua n-ro de informbulteno de Amazonas E-Asocio (Estrada Ponte Negra, 3060 - BR 69000-Manaus-AM). Ĝia interesa nomo, "La Trokano", estas prenita el la indiĝena lingvo kaj signifas specon de tamburo, per kiu la primitivuloj interkomunikiĝadis tra la densa arboro.

## BAHIA

★ S-ano Ronilson Menezes Mota (Rua Medeiros Neto 6, ap.1, Brotas, BR 40000-Salvador-BA) provis kaj sukcesis gvidi E-kurson en sia laborejo (Cia. CIQUINE, en la Petrolkemia Poluso de Camaçari-BA), kies lecionoj okazis dum la laborista tagmanĝa periodo. La oficiala bulteno de CIQUINE (n-ro 6) aperigis duonpaĝan artikolon pri la kurso kaj esperantaj konsideroj, ilustritan per foto pri Ronilson kun la kolegoj-lernantoj. Estas grave - opinias Ronilson - ke oni porpagandu la Lingvon pere de bultenoj similaj al tiu de CIQUINE, kiu cirkulas ne nur interne, sed ankaŭ inter klientoj el diversaj landoj.

★ La sekretario de Esperanta Studgrupo Zamenhof, s-ano José Sraiva Matos, ĝentile sendis al nia redakcio la jaran raporton pri la socia agado en 1983, kies ĉefaj eventoj jam ricevis de tiu ĉi Bultero oportunajn dissciigojn.Sed ni devas aldoni, ke la Studgrupo ĝemeliĝis kun esperantista organizaĵo el Angolo, celante antaŭenpuŝi la movadon en la Afrika Kontinento. Repondecas pri tiu faka interrilato s-anino Aldecy de Souza Xavier.

★ Ilhéus E. Grupo (Poŝtkesto 72, BR 45600-Ilhéus-BA) ĝis tiu ĉi momento rezignis starigi buston de Zamenhof en kiu ajn netaŭga publika loko, timante la ondon de vandalismo regantan sur la urbo, kiu jam difektis la bustojn de João Pessoa, Castro Alves kaj Misael Tavares. Sekve, oni petis kaj atendas permeson ĝin lokigi en la kvartalo de la Eduka Komplekso,inter la Lernejo Perpétua Marques kaj la Komunuma Instituto pri Edukado.

## MINAS GERAIS

★ Juna, dinamika kaj certe baldaŭa gvidanto de la ŝtata movado ekbrilas en Divinópolis. Ni parolas pri Paulo R. Santos, kiu antaŭ kelkaj monatoj transloĝiĝis al tiu urbo kaj tie komencis seriozan laboron por starigi esperantistan rondon, kiu jam aktivas surbaze de 15 gesamideanoj esperantigitaj de li. Nova elementa kurso komenciĝis la 4-an de februaro, ĉe CESU-Centro de Estudos Supletivos de Divinópolis (Rua Minas Gerais, 1474, BR 35500-Divinópolis-MG), ŝtata oficejo kie la lokaj esperantistoj movadas.

## PERNAMBUCO

★ Dum la 4-a Jarkongreso de BKE en Recife, aparte kunsidis la radioamatoroj PR7-AT-Jason Gonçalves de Lima, PY7-AJB-Geraldo Pires Sitônio, PY7-PY-Apolônio Honório Pessoa de Melo, PY7-DP-Pastro Francisco de Oliveira Barros Leal, PT7-CEL-José Maurício Pereira de Oliveria, PT7-JB-José Bastos Campos, PY7-VOV-Janete Cavalcanti Sitônio kaj PY7-TJ-Terezinha de Jesus C.C.P. Melo, kiuj decidis reaktivigi sian fakan asocion-Brazila Radioamatora Esperanta Klubo (BREK). Tiam, unuanime oni elektis novajn estraranojn, nome: George Otto Vaske (PYS-ACE), kiel Prezidanton; Jason Gonçalves de Lima, sekretarion, kaj Enivaldo Alves Silva (PT2-CA), kiel kasiston. Al ĉiuj, BKE gratulas kaj bondeziras feliĉan oficperiodon.

## RIO DE JANEIRO

★ Ĉiutage, kiel ferma programo, Jonas Rezende, el TVE-2 (Eduka Televida Stacio - Rio de Janeiro) prezentas 5-minutan mesaĝon sub la ĝenerala titolo "Conversa de Fim-de-Semana", tio estas Noktofina Babilado (BEL-informas, n-ro 10).

★ La prezidanto de BEL, kolonelo Fernando J. Galvão Marinho, vizitis en februaro la sidejon de Esperanto-Asocio de São Paulo, kiam li kaj estraranoj de EASP kaj BKE pritraktis la ĉefajn liniojn por efektivigo de la 20-a Brazila Kongreso de Esperanto.

★ En la decembra numero de gazeto regule eldonata de Grupo Espírita Francisco de As-

sis (Rua Djalma Dutra 28, br 24030-Niterói-RJ) samideano D-ro Joaquim de Couto aperigis aplaŭdindan artikolon kontraŭ la angla monolingvismo reganta en niaj lernejoj.

★ La gazeto "O Sul Fluminense" (Galeria Irmão Sales, 36, BR 27400-Barra Mansa-RJ) publikigis noton pri la elekto kaj enposteniĝo de la nova estraro de Barra Mansa Esperanto-Klubo por la jartrio 83/85. La nova prezidanto estas Idé Ebeling, kaj niaj karaj geamikoj Denise kaj Wilson Deslandes partoprenas ankaŭ en la estraro, respektive kiel sekretario kaj kasisto.

## SANTA CATARINA

★ Aperis la n-ro 5 de "Antaŭen", oficiala organo de E-Asocio de Santa Catarina (C.Postal 460, BR 88000-Florianópolis), kiu raportas pri loka movado kaj anoncas la okazigon de la 3a sudbrazila E-Renkontiĝo, en tiu urbo, la lastajn tagojn de oktobro venonta. La renkontiĝoj sudbrazilaj naskiĝis sub la inspiro de Prof. F.S. Almada, antaŭa prezidanto de BKE, kiu patronis la unuan renkontiĝon en Porto Alegre.

## RIO GRANDE DO SUL

★ Correio do Povo, malnova portugallingva gazeto de Porto Alegre fondita en 1895, publikigis en 24-01-84 malfermitan bileton subskribitan de D-ro Manoel Belmonte de Abreu, petante al la prezidentoj de USONO kaj de URSS, ke ili evitu la detruon de la homaro.

## SÃO PAULO

★ Sorocaba Esperanto-Klubo, pere de la estraranoj Manoel Blaz Garcia kaj Eluízio Bueno Rodrigues, kunvenigis dekojn da gesamideanoj en Itu-SP, en 26-02-84, okaze de la 2-a jara renkontiĝo de esperantistoj de la regiono de Sorocaba. Krom la prezidanto kaj estrarano pri kulturaj aferoj de BKE, ĉeestis multaj esperantistoj de la ĉefurgo São Paulo kaj eĉ reprezentanto de la S.E. Alan Kardec, s-ro Cesar Dornelles Soares, de Porto Alegre-RS.

★ En festa etoso, kun la ĉeesto de lokaj esperantistoj kaj multaj aliaj venintaj de São Paulo kaj Rio, gesinjoroj Almada ĵus inaŭguris esperanto-kurson en komforta salono de la Artgalerio Esperanto, situanta ĉe strato Timbiras n-ro 8, en la urbo Santos-SP. Tiam, post instrua prelego de D-ro Victor Sdler pri la perspektivoj de Esperanto, kaj de saluta paroladeto de nia prezidanto Cunha, la gastigantoj faris belan omaĝon al Prof. Lauro Jorge de Oliveira, unu el la pioniroj de la movado en Santos, donante lian nomon al iu ĉambro de la belaspekta artgalerio. La solenaĵo finiĝis per bongusta lunĉo, kies frandaĵoj konfirmis la jam faman kuirarton de S-ino Maria Almada.

★ BEJO okazigis en Promissão-SP, de la 25a ĝis la 29a de januaro, sian 6-an nacian kongreson kiu havis oficialan subtenon de la loka registaro.Multaj junuloj opiniis,ke tiu evento,kun partopreno de ĉirkaŭ 300 kongresanoj,estis la plej bone organizita kompare kun la antaŭaj, fakto kiun oni povas krediti al la organizkapablo kaj sperto de la novaj estraranoj de BEJO, kies prezidanto estas D-ro José Luiz Ferreira.

★ Efikan laboron por disvastigi Esperanton en la ĉefurbo São Paulo faras nuntempe Esperanto Grupo Adolfo Bezerra de Menezes (Rua D.Vicentina Alegretti 265, Penha - CEP 03.610 - São Paulo), Laŭ raparto de samideano Cassiano A. Macedo, krom rekta instruado de la Lingvo, la grupo ĝin propagandas per publikigo de artikoloj en tri urbaj gazetoj kaj unu trimonata revuo, per afiŝoj surmurigitaj en lernejoj, bibliotekoj kaj lastatempe, tio estas, ekde 06-02-84, per "videotexto", en la Komunuma Biblioteko Mário Andrade.



## LASTE APERIS

. . . la nova numero de "La Lampiro", organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, revenanta post iom longa silento. Ĝia aspekto estas simpla kaj plaĉa, dank' al multaj ilustraĵoj. La enhavo estas varia kaj interesa: (mallongigita) "Kristnaska Rakonto", de C. Dickens; prilingva artikolo de "Kovito"; indiĝena legendo elportugaligita de José Luiz Ferreira; medicina prelego de d-ro Paulo Sérgio Viana; "El mia vojaĝnotlibro" de G. R. Ledon; artikolo de Deodato F. Mello pri la valoro de kelkaj profesioj; opinioj pri la temo "ideala Esperanto-revuo".

Prezento de debat-temo estas certe allogaĵo por la legantoj, sede en ĉi tiu numero mankis paĝo pri spritaĵoj, nemalhavebla miaopinie por presaĵo, kia "La Lampiro".

Esperanto-revuo kun bona grafika aspekto kaj interesaj legaĵoj estas ja gravega kontribuo por la pliviglígo de nia afero. Gratulon al Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kaj speciale al la lerta redaktorino de "La Lampiro",s-ino Symilde S.Ledon.

o§I§o§o§o

Aperis en Februaro "Guia do Peregrino", speciala eldonaĵo de revuo "Planeta", enhavanta 2500 adresojn de asocioj ligataj al nutrado (Makrobiotiko, naturaj produktoj, Vegetarismo), sano (Akupunkturo, herboj kaj sanigaj plantoj, Homeopatio, Jogo), religioj (Esoterismo, Eubiozo, Rozcrucismo, Teozofio, Spiritismo), Astrologio, Esperanto, Grafologio, Taroo, Ufologio, ktp.

La listo ne estas kaj cetere ne povas esti kompleta. La respondeculoj pri "Guia do Peregrino" petas, ke oni skribu al "Revista Planeta", Rua Engenheiro Fox, 135, Caixa Postal 223, tel. 260-0533, branĉo 10, São Paulo, SP, CEP 05069, por informi pri nelistigitaj asocioj kaj adresŝanĝoj, cele al pli kompleta nova eldono de "Guia do Peregrino" (wf).


Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.



## KONTRIBUAĴOJ POR LA BULTENO

Ju pli da tempo pasas, des pli multkosta fariĝas ĉiu sinsekva eldono de tiu ĉi Bulteno. Pro tio, financaj kontribuaĵoj estas ĉiam bonvena. Al la subaj asociaj membroj kaj legantoj, kiuj monhepis aŭ abonis nian Bultenon en decembro, januaro kaj ĝis la 15-a de februaro, la redakcio prezentas sian koran dankon:

| | |
|---|---|
| Marcello Vieira de Andrade . . . | Cr$ 1.500,00 |
| José Frauzino de Souza . . . . . | 1.200,00 |
| Renato Lemos Diniz . . . . . . . | 2.000,00 |
| Adolpho Miranda Silva . . . . . | 1.000,00 |
| Oswaldo Leite de Moraes . . . . | 2.000,00 |
| Avelino Battaglini . . . . . . . . | 1.200,00 |
| Paulo Roberto dos Santos . . . . | 1.200,00 |
| José Conceição Amaral . . . . . | 1.200,00 |
| Harley Xavier de Melo . . . . . . | 1.200,00 |
| Jorge das Neves . . . . . . . . . . | 2.000,00 |
| José Martins Coelho . . . . . . . | 1.000,00 |
| Elvira Fontes . . . . . . . . . . . | 2.000,00 |
| Francisco Almada . . . . . . . . | 12.500,00 |
| Maria Almada . . . . . . . . . . . | 14.500,00 |
| Cláudio Zimmermann . . . . . . | 4.000,00 |
| Alberto Luiz Minardi Chueiri . . | 1.500,00 |
| Maria Luzineide de Souza . . . . | 500,00 |
| Álvaro do Espírito S. Rabelo . . | 1.000,00 |
| Fanny Belisher . . . . . . . . . . | 1.000,00 |
| Cesar Dorneles Soares . . . . . . | 1.200,00 |
| Nestor Lellis . . . . . . . . . . . | 3.000,00 |
| Eurico Antonio Ribeiro . . . . . | 800,00 |
| Francisca Martos . . . . . . . . . | 800,00 |
| Miguel Silva . . . . . . . . . . . . | 1.800,00 |
| Nélson Ribeiro . . . . . . . . . . | 7.800,00 |
| Wanderley Peres . . . . . . . . . | 2.000,00 |
| Eros Braga Biscotto . . . . . . . | 1.000,00 |
| Vicente Paulo Verneck . . . . . | 5.000,00 |
| Abel de Campos Pereira . . . . . | 800,00 |
| Eberardo Nepomuceno . . . . . | 2.800,00 |
| Hugo Fóscolo . . . . . . . . . . . | 2.800,00 |
| Gomercindo Dias Nunes . . . . . | 800,00 |
| Manoel Moacir Sisccati . . . . . | 1.200,00 |
| José Dias Pinto . . . . . . . . . . | 10.800,00 |
| Geraldo Pires Sitônio . . . . . . | 800,00 |
| Helmuth Schenk . . . . . . . . . | 2.000,00 |
| Jorge Luiz J. de Purgly . . . . . | 800,00 |
| Wilson Pereira Deslandes . . . . | 2.600,00 |
| Symilde Schenk Ledon . . . . . | 3.600,00 |
| Maria Ecarnação Moreno . . . . | 2.000,00 |
| Hersila Valverde . . . . . . . . . | 300,00 |
| Sylvio Malheiros . . . . . . . . . | 2.000,00 |
| José Carlos Gonçalves Vieira . . | 800,00 |
| Lauro Jorge de Oliveira . . . . . | 800,00 |
| Mário Ritter Nunes . . . . . . . . | 5.800,00 |
| Major Gilberto A.Silva Velho . . | 5.800,00 |
| Élio Lopes de Oliveira . . . . . . | 800,00 |
| Jacy Gonçalves de Miranda Sá . . | 800,00 |
| Guido Ferreira . . . . . . . . . . | 2.000,00 |
| Maria Cristina Pereira . . . . . . | 2.000,00 |
| Renei Antonio dos Santos . . . . | 2.000,00 |
| Carlos Raimundo Rocha . . . . . | 2.000,00 |
| Wellington Gonçalves . . . . . . | 2.000,00 |
| Letícia Helena Januário . . . . . | 2.000,00 |
| | 136.000,00 |



## EL LETEROJ RICEVITAJ

. . . "No Esperanto Notícias de janeiro, estou pedindo para que nossos amigos e coidealistas se tornem membros do Conselho ou assinantes de seu Boletim, o qual computo como o melhor informativo circulante no Brasil, atualmente." (Major Gilberto A. Silva Velho - Caçapava - SP).

. . . "Akceptu mian gratulon pro la numero 80 de la bulteno de BKE. Ĝi enhavas vere interesajn temojn, kiujn mi legis kun granda plezuro, kaj tre gravajn informajn por la brazila esperantisto. Ne nur la raporto pri la kvara Kongreso sur la unua paĝo, sed ankaŭ la raporto pri Financa Rezulto de la 66-a U.K., estas tre gravaj por la movado. Per tiu numero oni rimarkas, ke la gvidantoj de BKE estas ja kompetentaj kaj maturaj esperantistoj, meritantaj la laŭdon de la brazila esperantistaro".
(Délio Pereira de Souza, Rio-RJ)

**Redakcia noto** - Ni dankas, sed komprenas, ke la amikoj plej ofte parolas per la koro . . .

## PLIGRANDIĜAS NIA ANARO

Kun granda plezuro, ni informas, ke aliĝis al BKE dum la lasta semestro la gesamideanoj, nome:

Álvaro Fausto de Souza - RJ, Gilson Villas Bôas Passos - MA, Nelcy Zamora - DF, Joel Maciel Soares - RJ, Onézimo da Costa e Faria-MG, Ricardo Fernandes da Costa França - RJ, Lair Alves Moreira - SP, Edvaldo Silva Machado - MG, Waldemar Antonio Mendes - MG, Maria Luisa Bilot - RJ, Jão Batista da Silva - PE, Idevalter Alecrim Pereira - BA, Aldacy de Souza Xavier - BA, Antonio Serravalle Magalhães -BA, Edgar Nunes - BA, Nelson da Costa Barreto - BA, Neusa Caldas Figueiredo - BA, Nizete Nunes da Silva - BA, Yvette Menezes Queiroz - BA, Bruno Sérgio Veras de Morais - DF, José Bastos Campos - CE, Fabrício Possebon - SP, Benito Alcântara de Figueiredo - BA, Alfredo dos Santos Guerreiro - RJ, Renato Lemos Diniz - DF, Maria Luzineide de Souza - CE, Fanny Bleisher-DF, Oswaldo Barbosa de Souza - RJ, Therezinha Conceição B.da Silva - BA, Eurico Antonio Ribeiro - SP, Abel de Campos Pereira - PR, Geraldo Pires Sitônio - PE, Jorge Luiz Joszas Purgly - SP, Gilbert René Ledon - SP, Maria Encarnação Moreno - SP, Kaj Sylvio Malheiros - RJ.

OoOoOo

Ĝoje ni fieras pro la amasa aliĝo, kio ja montras plena fido de ĉiuj je nia laboro. La novaj individuaj membroj de BKE akceptu la plej varmajn dankesprimojn de la estraro.

# ENKETO DUM LA SEMINARIO DE OURO PRETO

PAULO R. SANTOS

En la unua tago de la Seminario oni disdonis kune kun la paperujoj, demandarojn al 200 homoj ĵusvenintaj. El ĉi tiuj 200 demandaroj 43 estis redonitaj. Kelkaj dum la Seminario kaj aliaj post ĝi, perletere.

La demandaroj celis stargi la ĝeneralajn trajtojn pri la brazila esperantisto. Ekscii kial li fariĝis esperantisto, kiel li movadas, kion li pensas pri la evoluo de Esperanto en nia lando; finfine, kiu estas li/ŝi meze de la brazila E-movado. La informoj kunigitaj per la redonitaj demandaroj, kvankam malmultnombre, permesas al ni komenci analizon pri la afero. Ĉi sube mi transskribas la informojn havigitajn kaj ĉiu povos per si mem rezoni super ili, provante havigi al si pliajn nuancojn pri la brazila E-movado.

El la 43 samideanoj (21,50% el la tuto) kiuj bonvolis redoni plenigitajn demandarojn, 27 estis viroj kaj 16 virinoj, Inter ili 19 estis ĝis 25 jaraj;09,26 ĝis 39 jaroj kaj 15 pli ol 40 jaroj. Per la urboj de kie ili venis oni povis konkludi, ke ĉiuj brazilaj regionoj reprezentiĝis.

— Rilate instrugradon, 01 ne informis la sian;02 havis unuagradan kurson; 11 duagradan kaj 29 superan (!). Tiu nombro da fakuloj igas nin pensi kial ili ne laboras por kaj per Esperanto laŭ sia fako. Oni diras, ke Esperanto devas esti uzata en la scienca medio por vere venki, sed kiel tio okazos se la esperantistaj fakuloj plejparte ne uzas ĝin?

— El la 25 fraŭ (in) oj, 14 edz (in) oj kaj 04 en aliaj situacioj, 08 estis romkatolikaj; 09 ne religiemaj; 01 ne informis sian religion; 01 apartenis al minoritata religio kaj 24 estis spiritistoj (kiel atendite).

Laŭ lerno-metodo, 01 ne informis la sian; 07 lernis E per rekta metodo kaj 35 per la gramatika. Inter ili, 07 lernis E celante korespondadon; 07 celis verki aŭ legi en fremda lingvo (tiukaze Esp.), kaj 29 lernis ĝin por iuj ne specifaj celoj. Oni demandis ankaŭ la E-scion de la demandito, kaj 01 ne informis ĝin; 01 estas instruisto; 19 sin opinias fluparolantoj kaj 22 komencantoj (ĉu la "eternaj komencantoj?).

— Inter tiuj samideanoj 09 ĝis tiam ne partoprenis E-renkontiĝojn kaj 34 jes. La plimulto preferas legi, korespondi aŭ aktivi en la movado; kelkaj preferas verki aŭ traduki kaj aliak (07 el la tuto) preferas aktivi per Esperanto en aliaj movado. 11 ne abonas E-revuojn; 32 abonas, sed multaj legas nur "Momenton", kiu aperas malofte. 16 homoj ofte aĉetas librojn en Esperanto (ĝis 10 jare); 27 malofte aĉetas E-librojn (1 aŭ 2 jare).

Alia grava informo estas, ke 06 ne apartenas al iu E-organizo; 37 jes; elstaras UEA, BEJO kaj BKE (informa bulteno) kaj al regionaj E-organizoj. Montriĝis, ke ĉiuj ekzerciĝas en legado, skribado aŭ parolado, sed pli ol la duono tion faras malmulte. Ankaŭ evidentĝis,ke la grandega plimulto propanas la rektan metodon kiel plej bonan rimedon por lerni E., kune kun la helpo de muzikoj kaj tekstoj. Malmultaj konsilis la gramatikan.

Cetere, ĉiuj konsentas pri la graveco de la partopreno en E-renkontiĝoj.

— 19 diris, ke instruanto ne estas nepre necesa por lerni E.; 22 diris, ke jes; 02 ne donis siajn opiniojn. 18 opinias, ke E. ne estas lingvo internacia, sede ĝi taŭgas por fariĝi tia; 02 ne donis siajn opiniojn kaj 30 diris, ke E. estas ja la lingvo internacia. Inter ili 29 eksciis pri E. per geamikoj; 08 per gazetoj aŭ libroj; 06 per radio, televidilo, afiŝo, ktp.

— Al la demando ĉu E. estas (aŭ povus esti) io krom lingvo, oni donis la jenajn opiniojn:03 diris, ke Esperanto estas la avangardo de iu tutmonda religio; 12 ke E estas politika batalilo por ŝanĝi la socion; 06 ke ĝi estas nur helplingvo; 16 ke ĝi estas ia filozofio; 06 ne donis siajn opiojn. La demando kiamaniere oni povos pli efike porpagandi Esp. estis respondita jene: la plimulto diris, ke per radio aŭ televidilo;poste venis la propono "persone" kaj laste per la helpo de la registaro aŭ/kaj de iu religio. Malmultaj opinias,ke libroj kaj gazetoj estas bonaj propagandiloj.

— Al la lasta (kaj grava) demando pri la kvalito de la laboro de la landaj E-organizoj, oni donis la jenajn respondojn: 14 diris, ke ĝi estas bona; 08 ke ĝi estas sufiĉe bona; 01 ne scias kaj 20 diris, ke ĝi ne estas bona. La ĉefaj kialoj estis la jenaj: laboro ne kohera, malbone programita kaj kelkfoje ne neŭtrala; la tri "kapoj" de la landa E-movado, KKE, BKE, BEL, izoligis unu de la aliaj.

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.

La ĉi supraj informoj sufiĉas por iom da cerbumado, sed ĉiu esperantisto, kiu vere interesiĝas pri la lingvo kaj pri ĝia evoluo devas fari tiajn demandarojn, profitante la regionajn E-renkontiĝojn, ĉar post iom da tempo kaj da interŝanĝo de informoj ni havigos al la brazila E-movado pli (scienca) memkono kaj tiam oni povos enkonduki pli efikajn instru-metodojn, propagandrimedojn, ktp.

## POSTKARTOJ POR LITTLE BUDDY

*Fare de LABRE (Brazilaj R-Amatoroj) estas kampanjo por morale subteni knabeton, kiu suferas pro leukemio k post kelkaj monatoj eble mortos. Li mem scias tion. Li estas PK-kolektanto k ege deziras fariĝi ĉampiono por enesti faman registron. Laŭ peto de nia delegito George Otto Vaske, oni tuj sendu al LITTLE BUDDY (Poŝtkesto n-ro 26, PAISLEY/REMSFORSHIRE - SKOTLANDO), postkarton kun la teksto: "Viaj brazilaj amikoj entuziasme subtenas vin, por que via nomo estu enskribita en la GUINESS-REKORDLIBRO. Dio Benu vin. Amike, via ....(subskribo)"*

## JOSÉ CECÍLIO DE CARVALHO

*Konsternite, ni komunikas la forpason de nia altestimata s-ano José Cecílio de Carvalho, de la urbo Pompeu, ŝtato Minas Gerais, okzinta la 25-an de februaro.*
*Ĉiam preta helpi kaj subteni la aferojn ligitajn al la Internacia Lingvo, li estis unu el la unuaj esperantistoj kiuj aliĝis al la memorinda kampanjo kiu ebligis aĉeti sidejon por BKE en Brazilja.*
*Individua membro de nia Asocio sub la enskribnumero 140, sincera kunlaboranto de la estraro kaj konstanta leganto de nia Bulteno, inter la lastaj deziroj de la mortinto estis la renovigo de la aliĝotizo al BKE por 1984.*
*Efektive, por plenumi la aspiron de sia avo, S-ro Sérvio Túlio de Carvalho, oficisto de Banko de Brazilo en Vilhena - Rondônia pagis la kotizon kaj perletere rakontis la kortuŝan epizodon, kiu ege emociis nin.*
*Dankon, karmemora Amiko. La tero estu malpeza por via korpo kaj en la alto ripozu en paco via animo!*

## NOVAJ BATALANTOJ EN LINS (SP)

*La 25-an de januaro pasinta diplomiĝis 25 gelernantoj de Prof. Waldemiro Moreira rilataj al kurso kiun li gvidis en la "Missão Salesiana Dependencia de Lins" en la urbo Lins (SP).*

*Tiu kurso okazis kun la apogo de la Ĝenerala Direktoro de la Fakultato Salesiana de Lins kaj de la San-Paŭlo Esperanto-Asocio.*

*Oni povis konstati, ke la gelernantoj sufiĉe bone lernis la elementan parton de la konoj pri Esperanto. La kurso daŭris kvar semajnoj, do entute 36-hora instruado.*

*Laŭ peto de Prof. Waldemiro s-ino Maria Almada faris prelegon pri Esperanto kaj Arto, kaj la gelernantoj, novbakitaj, sufiĉe bone komprenis la poraladon de la prlegantino.*

*Estas gratulinda la laboro de Prof. Waldemiro.*


## SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO

**Horizontale:** 1-UEA, 2-festo, 3-investi, 4-estrarano, 5-transtombul, 6-ekstersezonaj, 7-nu, 8-ol, 9-elpremi, 10-konkonar.
**Vertikale:** 1-geesperantistaro, 2-ulo, 3-PK, 4-en, 7-nek, 8-amo(inv), 9-lir.

## FAKTOJ KAJ FOTOJ



**Grupo partoprenanta en la 2-a Renkontiĝo de Esperantistoj de la Regiono de Sorocaba okazinta en la urbo Itu-SP, en 26.02.84**



**D-ro Victor Sadler kaj Prof.Francisco Almada, dum la inaŭguro de E-kurso en la Artgalerio Esperanto de Santos-SP.**



**Nia prezidanto Carlos Cunha, inter ataŝeoj de la brazila ambasado en Stokholm, okaze de la akcepta koktelo por landaj reprezentantoj ĉeestantaj la 65-an UK.**

# CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

## 1983

### BALANÇO GERAL

**ATIVO**

| | | | |
|---|---|---|---|
| **CIRCULANTE** | | | |
| Bancos | | 104.450,20 | |
| Caixa | | 143.148,85 | 247.599,05 |
| **REALIZAVEL A LONGO PRAZO** | | | |
| Rendas a Realizar | | | 6.200,00 |
| **PERMANENTE** | | | |
| Participações | | 5.000,00 | |
| Imóveis | 2.040.000,00 | | |
| -correção monetária | 3.193.575,00 | 5.233.575,00 | |
| Móveis e Utensílios | 195.248,00 | | |
| -correção monetária | 249.213,00 | 444.461,00 | 5.683.036,00 |
| **COMPENSADO** | | | |
| Contratos de Seguro | | | 3.680.000,00 |
| | | | 9.616.835,05 |

**PASSIVO**

| | | |
|---|---|---|
| **PATRIMONIO LIQUIDO** | | |
| Fundo Social | | |
| -exercícios anteriores | 2.674.434,72 | |
| -exercício de 1983 (incremento) | 3.130.146,46 | 5.804.581,18 |
| **EXIGIVEL A CURTO PRAZO** | | |
| Contas Correntes | | 132.253,87 |
| **COMPENSADO** | | |
| Bens Segurados | | 3.680.000,00 |
| | | 9.616.835,05 |

### DEMONSTRAÇÃO DA CONTA "RESULTADO DO EXERCÍCIO"

**DEBITO**

| | |
|---|---|
| AGUA LUZ E TELEFONE | 77.711,87 |
| BOLETIM-Despesas com confecção | 335.018,00 |
| BOLETIM-Despesas postais | 97.535,00 |
| CONGRESSO ANUAL-Despesas diversas | 581.502,30 |
| CONGRESSO ANUAL-Rateio Comissão Local | 89.948,85 |
| CONGRESSO ANUAL-Rateio Conselho | 89.948,85 |
| CONSERVAÇÃO DE IMÓVEIS | 5.500,00 |
| CONSERVAÇÃO DE MÓVEIS E UTENSÍLIOS | 26.800,00 |
| CÓPIAS DE DOCUMENTOS | 18.610,00 |
| DESPESAS BANCÁRIAS | 1.526,00 |
| DESPESAS DE CONDOMÍNIO | 160.960,00 |
| DESPESAS POSTAIS | 21.656,00 |
| IMPOSTOS E TAXAS | 27.704,90 |
| MATERIAL DE ESCRITÓRIO | 50.693,00 |
| MATERIAL DE HIGIENE | 1.155,00 |
| RATEIO DO 3º CONGRESSO ANUAL (1982) | 219.670,00 |
| SEGUROS | 10.094,95 |
| | 1.816.034,72 |
| Superavit transferido para FUNDO SOCIAL | 3.130.146,46 |
| | 4.946.181,18 |

**CREDITO**

| | |
|---|---|
| CORREÇÃO MONETÁRIA DO ATIVO PERMANENTE | 3.442.788,00 |
| ANUIDADES | 459.200,00 |
| CONGRESSO ANUAL-Receitas Diversas | 761.400,00 |
| DONATIVOS PARA O BOLETIM | 167.980,00 |
| RECUPERAÇÃO DE DESPESAS | 6.064,33 |
| RENDAS COM O BOLETIM-Assinaturas | 9.600,00 |
| RENDAS COM O CONGRESSO ANUAL | 89.948,85 |
| RENDAS DIVERSAS | 9.200,00 |
| | 4.946.181,18 |

Brasília(DF), 31 de dezembro 1983

Carlos Augusto S. Cunha - Presidente

José Carlos D. Ramos - Tesoureiro

Centro de Cópias Cerqueira Compôs e Imprimiu